# Parolado de la 5a Komuna Konferenco de IKEF

## Virtuala videokunveno per Zoom

### La 6a de Marto 2022

Ĉielismo WANG Tianyi, prezidanto de IKEF

Karaj ĉiuj estraranoj, ikefanoj kaj kursanoj,

Saluton!

Hodiaŭ okazas la 5a komuna konferenco de IKEF refoje per la video-kunveno. Tio signifas, ke la korona epidemio ankoraŭ kuras kiel pan-demio tra la mondo. Ĝi damaĝas la homan vojaĝon, fizikan kunvenon kaj ankaŭ la mondan ekonomion kaj komercon. Okaze mi devas konfesi, ke en tia kondiĉo ankaŭ Esperantaj aranĝoj kaj aplikadoj estas malfacilaj eĉ tre malfacilaj kompare kun pasintaj jaroj. Tamen danke al kuraĝado de niaj ikefanoj kaj kursanoj, ankaŭ danke al la laste mondfuroranta videokunveno kiel nova platformo por internacia komunikado, IKEF ne silentas kiel aliaj, kaj ne perdis la valoran tempon, sed pli aktivas per regulaj videokunvenoj organizite de la solidara teamo konsistanta el estraranoj kiel Ĉielismo(Tianyi), Jaso(Yas), Enĉjo (Enkhee), Longarko (Changsheng), Suruŝo (Surush) kaj Johano(John H.) por la teknika subteno, programa kondukado kaj prelegopreparo k.t.p. Ankaŭ estas laŭdinde ke spite al la pandemia kvaranteno vicprezidanto Ludoviko Zhao kreis novan Esperanto-kurson nome de IKEF, kaj danke al la niveloprofesia organizanto Saĝa(黄敏). kun siaj teamanoj Heroa （周英）、Leterano(王乐天)、Verdulo(陈建生)、Venko(陈胜利)、Temara(诸道远)、Tutano(曾升全) kaj Tigro(樊虎） la kurso havas 280 lernantojn kaj bone funkcias ĝis nun. Evidente niaj videokunvenoj kaj kursoj donis al IKEF veran preskiĝon en Esperantujo. Mi gratulas al tiuj sikcesoj faritaj kune de niaj ikefanoj kaj kursanoj!

Tamen tio ne estas fina celo de IKEF. Niaj videokunvenoj volas persiste okazigi sin cele por trejnadi kaj spertigi iujn ikefaojn, kiuj kapablos labori per Esperanto por internacia komerco kaj kunlaboro. Niaj kursoj volas prepari amason da homoj, kiuj povos doni al IKEF

novajn membrojn, kunlaborajn turistojn kaj venontajn aktivulojn, eĉ studantojn aŭ laborantojn de la planite virtuala kolegio pri la internacia komerco. Nia sperto donas al ni valoran lecionon ke ĉia projekto kaj sukceso bezonas bonan preparadon. Tuja sukceso ne ekzistas en la vivo precipe por la komerco kaj turismo. Danke al tiuj preparoj faritaj de supre menciitaj personoj nun nia IKEF atendas iun ŝancon en la venonta tempo eĉ en la jaro 2022..

Pri la venonta estonteco de IKEF mi estas pozitiva kaj esperoplena, kvankam nun Esperanto-movado maljuniĝas kaj sendirektiĝas, ankaŭ nuntempe okazas la milito en Ukrajnio. Pri tiel malbona stato ni ikefanoj malkonsentas kun iu ajn milito. Ni ikefanoj amas la pacon kiel nian vivon. Ni ikefanoj kondutas kiel Zamenhof promesis al la interkompreniĝo inter la malsamaj popoloj. Pro tio ĉesu iu ajn milito en la mondo, ankaŭ la rusia kontraŭ Ukrajnio, ĉar la homaro ne permesas al iu ajn per la militado detrui la homan vivon! Malgraŭ tio kaj ĉio hodiaŭ la paco kaj progreso ankoraŭ estas ĉefaj tendencoj de la mondo. Pro tio hidiaŭ en la 5a komuna konferenco de IKEF sekve nia estrano Enĉjo(Enkhee) prezentos la novan laborplanon por 2022, kiu fakte indikos strategion de IKEF, ke kvankam ni energie laboras kaj aktivas forme de la virtuala agado, tamen IKEF celas finfine al fizikaj kunvenoj, karavanoj, kolegioj kaj laboroj. La homa sociviva laboro rezulte devas nutri homojn kiel profesiulojn. Se ne tiel rezultos, IKEF ne povos vividaŭri kune kun plejparto de ikefanoj, kiuj esperas ke IKEF estu pli potenca. Por realigi la celo kaj laŭ nia statuto naski la novan estraron periodan por la jaroj 2022-2025, poste laŭ la programo mi prezentos al la 5a Komuna Konferenco la nomaron de la nova estraro, kaj petos vian aprobadon.

Fine, mi refoje dankas al ĉiuj estraranoj kaj ikefanoj, kiuj faris rimarkindajn kontribuojn al IKEF en la pasinta periodo de la estraro. Mi refoje gratulas al la 5a Komuna Konferenco de IKEF la plenan sukceson kun ĉiuj programeroj. Mi ankaŭ gratulos al baldaŭ naskiĝonta nova estraro por la jaroj 2022 – 2025. Mi ankaŭ esperas ke ĉiuj ikefanoj ni kune kunlaboru gvidote de la nova estraro por realigi la laborplanon por la jaro 2022. Ni kredas je IKEF kaj ĝia estonteco! Koran dankon!

Okaze de la 5a Komuna Konferenco de IKEF

La 6a de Marto 2022